

# la Riverego

---

Bulteno de la Esperanto-Societo Kebekia  
Junio 1988-a. N-ro 11-a. Jarkolekto 3-a.

---

## Tour d'Europe à vélo



---

Oslo. En 1987, pour le centenaire de la langue internationale ESPÉRANTO, a été organisé un gigantesque *Tour d'Europe* à vélo pour *abattre le mur des langues*. Pendant quelques heures, quelques mois, cinquante-six personnes ( 11 à 70 ans ) de neuf pays ont pédalé *sur 360 villes* pour informer sur le problème linguistique mondial et les dépenses énormes qu'il entraîne. Ils répondirent à 250 interviews ( 13 télévisées ) pendant ce voyage qui dura dix mois en vingt pays. Ils furent souvent accueillis par les autorités locales ( maires, etc. ) qui ont toutes signé leur *Livre d'Or* pour soutenir l'idée et encourager les cyclistes.

Après ce succès, *Biciklista Esperantista Movado Internacia* et les groupes locaux de soutien organisent un nouveau *Tour d'Europe Sans Frontière* ( ni géographique, ni linguistique ), à l'occasion des quarante ans de la *Déclaration Universelle des Droits de l'Homme* dont l'article 2 précise les mêmes droits et libertés pour tous les humains « sans distinction aucune de... de langue, de... ». Que ceci passe dans les actes en milieu international ( touristique, commercial, de communication, de relations interculturelles, intergouvernementales, interpersonnelles ) par une solution neutre comme ce fut le cas en juillet 87 où 6 000 délégués de soixante-treize pays ont pu vivre le Congrès universel de Varsovie dans le respect de la culture de chacun.

Le communication directe est aussi un Droit de l'Homme !

L'espéranto est-il une solution adéquate ? [ source : bulletin de B.E.M.I. ]

Pour plus de renseignements sur le tour d'Europe, contacter la S.Q.E.□

## Informa servo

La estraro de E.S.K. proponis al K.E.A. novan manieron pritrakti la informpetojn pri Esperanto. Nuntempe ilin pritraktas la Landa Oficejo de K.E.A., sed ĉion presis E.S.K. — kun sia nomo. Deekstere ŝajnas, ke E.S.K. plene responsas pri la informado. Kaj la dulingveco de *La Riverego* obligas rapidan kreskon de la membronombro de E.S.K.

Tial, E.S.K. plene responsus pri la informado en Kebekio kaj, pli ĝenerale, pro franc-lingvaj Kanadanoj. Kontraŭ tio, K.E.A. subvencius E.S.K.-on

500 \$ jare, kvazaŭ E.S.K. anstataŭus la malnovan Informan Fakon Francingvan de K.E.A. La estraro de E.S.K. opinias, ke tio nur plibonigus la informadon pri Esperanto.

Ni ne forgesu, ke K.E.A. estas sufiĉe riĉa organizo: dum la Jubilea Jaro, ĝi sukcesis profiti je 2 000 \$, dum E.S.K. malprofitis, pro ĝia granda aktiveco.

La proponon nun perpoŝte diskutas la estraro de K.E.A. Fina respondo venos nur post unu monato. □

### Bulletin trimestriel de la Société québécoise d'espéranto.

*La Riverego* estas eldonata de Esperanto-Societo Kebekia. Aperas trimonate.  
Eldonkvanto: 250. ISSN 0830-9574. Dépôts légaux: bibliothèques nationales du Canada et du Québec.

Premier trimestre 1986.

Redaktanto: Sylvain Auclair.

Kunlaboris Héliène Blais, Suzanne Bolduc, Jean Bureau, Martin Lavallée kaj Patrice Mongeau.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Sendpage por la membroj de E.S.K. Por la aliaj: jara abono: 5 \$ por mara sendo; 6 \$ por aera sendo. UEA-kodo: keb-k-d.

Ucuopa numero: 1.50 \$.

Limdato por la venonta numero: 1-a de septembro 1986-a.

Adreso: Esperanto-Societo Kebekia  
C.P. 126, succ. « Beaubien »  
Montréal, Québec  
KANADO H2G 3C8 telefono: (514) 495-8442

## « La Ĉeroka Esperantisto » aperas

*Il s'agit de la transcription d'une lettre manuscrite envoyée à plusieurs revues. Lisez-la attentivement: l'affaire est importante. J'ai rencontré l'auteur lors d'une conférence qu'il a donnée (dans une salle comble) lors de mon séjour en R.F.A., à l'été 85 et il m'a paru bien sympathique. Note: ĉeroko signifie Cherokee. Réd.*

Mi estas juna ĉeroko, fraŭlo kiu eldonas gazeton. Mi parolas la rapide pereantan ĉerokan lingvon. Mia hejmurbo estas « Tablequah », Oklahomo, Usono, la ĉefurbo de la Ĉeroka Nacio.

Dum du jaroj mi vojaĝis tra la Esperantujo de Azio en Japanio, Koreujo, Filipinujo, Tajlando kaj Hong-Kongo.

Dum du jaroj mi aktivis en la Esperantujo de Eŭropo en 14 landoj. Mi estas dumviva membro de U.E.A.

Mi faris pli ol cent prelegojn ĉe esperantistaj grupoj tra la mondo. Mi prelegis interalie pri ĉeroka lingvo kaj historio.

Mi laboris por Esperanto en Tanger, Maroko, kaj Mombasa, Kenjo.

En 1985 la Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko eletis min esti la ĉefo de usona junulara delegacio kiu dum unu monato ekskursis tra Germanio kiel gastoj de la germana registaro survoje al la Universala Kongreso en Aŭgsburgo. Kia agrabla monato!

Mi nun estas en malliberejo. Mi frontas mortpunon pro krimoj pri kiuj mi estas senkulpa. Detaloj pri

ĉi tio aperos en mia gazeto « La Ĉeroka Esperantisto ».

Ciu numero de la gazeto havos interalie: 1. Ĉeroklingvan sekcion kun esperanta traduko kiu estos io el la ĉeroklingva literaturo. 2. Sekcion pri ĉeroka gramatiko kaj lingvistiko. 3. Sekcion pri ĉeroka historio kaj kulturo. 4. Rubrikon pri Poliespo.

Kiam Zamenhof prezentis Esperanton al la mondo, Ĉerokujo estis sendependa nacio kiel Germanio aŭ Japanio. Iam Ĉerokujo estis tiel granda ke nun 8 usonaj ŝtatoj okupas tiun terenon. Tiam ĉerokoj loĝis en 60 urboj, 200 vilaĝoj kaj havis registaron multe pli demokratian ol la posta usona. Ekzistis 4 dialektoj de la ĉeroka lingvo. Dialektanoj kun la konsonanto « R » pafmortiĝis far blankuloj kaj la dialekto pereis. La ŝtato Virginio faris leĝon laŭ kiu blankulo mortiginta ĉerokon tuj ricevis \$130.00 (unuĵaran salajron) je prezento de kaphaŭta hararo al marŝalo. Multaj blankuloj vivtenis tiel murdante eĉ bebinojn. Ĉerokujo militis kaj traktatis pli kun Usono ol iu ajn alia nacio faris.

En la gazeto mi pritraktos la demandon: Ĉu Zamenhof studis la ĉerokan lingvon? En 1828 aperis « La Ĉeroka Fenikso », la unua indianlingva gazeto en la mondo. Ĉerokujo estis la sola nacio kiu sendis sian gazeton senpage al malriĉaj civitanoj. La ĉeroka lingvo estis unu el la malmultaj lingvoj de la mondo kun presita literaturo. Ĉerokoj estas la sola

indiana popolo kun sia propra skribsistemo. Ĝi estas silabaro inventita de « Sequoyah » (Sekvojo)

Oni diras ke li estis la sola homo en monda historio kiu kreis skribsistemon por sia propra popolo. Dum la junaĝo de Zamenhof Ĉerokujo, Sekvojo, kaj « La Ĉeroka Fenikso » estis famkonataj aferoj en la mondo. « La Ĉeroka Fenikso » havis multajn abonantojn en Eŭropo. Eŭropaj ĵurnalismaj kaj lingvistikaj rondoj ŝatis havi kopiojn de ĝi. Presita en la sekvoja silabaro, kun partoj tradukitaj angle, ĝi estis la plej bona studilo por indiana polisinteza lingvo kiu iam aperis ĝis tiam.

En 1838 Usono invadis kaj metis ĉerokojn en koncentrejojn. En la mezo de tre akra vintro, la usona armeo devigis ĉerokojn marŝi transkontinente en sovaĝejon, hodiaŭan Oklahomon. En tiu « Pado de Larmoj » unu kvarono de la popolo mortis. Preskaŭ ĉiuj maljunuloj, beboj, kaj gravedaj virinoj mortis. Malstamorto, frostiĝo, kaj malsano regis. La usona armeo ĉirkaŭis kun pafiloj. Du verboj regis: marŝu aŭ mortu. Aŭtonomia Ĉerokujo denove ekestis kun « Tahlequah » kiel ĉefurbo.

En « Tahlequah » mi iris al elementa lernejo, mezlernejo, kaj gimnazio. La instruado de la ĉeroka lingvo kaj historio lerneje strikte kontraŭleĝis. Kontraŭleĝis eĉ por ni ĉerokoj elekti nian propran ĉefon.

Multaj profesoroj, doktoroj, lingvistikistoj k.a. diraĉas ke Esperanto estas tro Eŭroplingveca kaj tial netaŭga por esti justa monda interlingvo. La ĉeroka lingvo pruvas ke ili eraras. Ili diras ke ne ekzistas lingvo pli fremda al la ĉefaj eŭropaj lingvoj ol la ĉeroka: ili pravas. Ili diras ke

ĉeroka lingvistiko montras la netaŭgecon kaj nejustecon de Esperanto pro granda fremdeco kaj malsameco de la ĉeroka: ili malpravas. Ili sufiĉe studis nek la ĉerokan nek la esperantan. Ekzistas grandaj kaj gravaj similaĵoj inter la ĉeroka kaj Esperanto. La ĉeroka lingvo klare montras la justecon kaj taŭgecon de Esperanto kiel internacia lingvo. Se vi batalas por Esperanto, nepre metu la ĉerokan argumenton en vian argumentaron!

En la esperanta kaj en la ĉeroka, sed ne en la angla (la plej granda eŭropa lingvo) oni: 1. Faras grandan uzadon de kunmetiteco kaj afikseco. 2. Uzas la vokalon « a » por sufikse esprimi la estantecon. 3. Uzas la vokalon « i » por sufikse esprimi la pasintecon kaj la infinitivon. 4. Uzas la vokalon « o » por sufikse esprimi la estontecon. 5. Uzas la vokalon « u » por afikse esprimi la kondiĉon kaj la imperativon. 6. Uzas la demandan silabon « ĉu ». Ekzistas multaj pliaj similaĵoj. Mi klarigos pri ĉi ĉio en « La Ĉeroka Esperantisto ».

En la gazeto mi pritratos la demandon: Ĉu la radiko « edz » venis el la ĉeroka? Esperantologoj diras ke la radiko « edz » estas la sola radiko en la Fundamento kiu ne venis el iu nacia eŭropa lingvo. Ekzistas diversaj malkonsentoj kaj teorioj pri ĝi. Ekzistas multaj tre interesaj paraleloj kaj samaĵoj inter la vivoj de Sekvojo kaj Zamenhof, rakontotaj en « La Ĉeroka Esperantisto ». La plej okulfrapa estas la fakto ke la patro de Zamenhof bruligis la skribaĵojn de Zamenhof same kiel la edzino de Sekvojo bruligis la skribaĵojn de Sekvojo. Atentu, do, ke la plej okulfrapa paralelo rilatas al la

PATRO kaj la EDZINO. PATRO en la ĉeroka lingvo estas «edod» ; kaj patrino en la ĉeroka estas «EDZINO». Do, «edod» kaj «edzino» estas tute ĉeroklingvaj vortoj. Sed, ili estas preskaŭ esperantaj, ĉu ne? Oni nur devus forpreni «d» kaj enmeti «z» ĉe unu kaj fari nenion al la alia. Jen la demando: Ĉu Zamenhof sekvojante sekvis la sekan vojon de Sekvojo?

Ĉu vi jam demandi: Kio estas Poliespo? Ĝi estas lingvo inventita de mi. Ĉu mi estas reformisto? Ne. Ĉu la celo de Poliespo estas por konkurenci kontraŭ Esperanto? Ne. Ĉu ĝi estas kiel Volapuk k.t.p.? Ne. Por lerni flue paroli Volapukon, idon aŭ «Interlingua»-on oni tute ne devas scii Esperanton. Ne eblas flue paroli Poliespon sen bone scii Esperanton. Poliespo estas POLIsinteza ESPerantO. Ĝi estas indiana lingvo. En Esperanto kaj en la angla oni devas diri almenaŭ 3 vortojn por esprimi subjekton, verbon kaj objekton. En polisinteza lingvo oni povas kaj tre ofte diras subjekton, verbon, kaj objekton en unu sola vorto. Ekzistas 4 lingvospecoj laŭ strukturo: 1. Fanda (latina, greka). 2. Aglutina (japana, korea, Esperanto). 3. Izola (vjetnama). 4. Polisinteza (ĉeroka, vaska, azteka, eskima [la nacia lingvo de Grenlando]). Sed neniu lingvo estas cent-procente laŭ ĝia kategorio. Ekzemple, la ĉeroka ne estas cent-procente polisinteza. Fakte, la meznombra ĉeroka (kaj poliespa) frazo analiziĝas en du pli-malpli egalajn partojn: 1. La izoleca kaj/aŭ aglutineca parto. 2. La polisinteza konstruaĵo P-o (Poliespo) uzas la ĉerokan polisintezan sistemon. P-a frazo havas, do, du partojn: 1. la espo (la izoleca kaj/aŭ aglutineca parto). 2.

la polio (la polisinteza konstruaĵo). La espo estas zamenhofa E-o. La polio estas ĉerokaj afiksoj kun esperanta(j) radiko(j) je ĉeroka lingvistiko.

Cio lingvistika havas siajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn. La bela afero pri polisinteza vorto estas ke ĝi ofte estas pli simpla kaj utila ol ĝia ekvivalento en izola, fanda, aŭ aglutina lingvo. La nebela afero estas ke ĝi ne ĉiam estas tiel. La bela afero pri Poliespo estas ke oni havas elekton. Kiam polio pli simplas kaj utilas: uzu ĝin. Sed, kiam normala E-o pli simplas kaj utilas: uzu ĝin. La ĉerokaj ecoj kaj spirito de la polio protektos kaj gardos la Zamenhofan Fundamenton ĉiam pro unika gramatiko. Ju pli da p-istoj estos des pli da e-istoj estos. Preskaŭ ĉiuj ĉerokaj afiksoj troviĝas en P-o. Specoj de ĉerokaj afiksoj estas apenaŭ imageblaj en E-o, ezemple la subjekto-objekto-afiksoj. En P-o ekzistas, ekzemple unu tri-silaba vorto kun la signifo: «Mi amas vin ambaŭ». La unua silabo estas subjekto-objekto-afikso kun la signifo: «mi-vin-ambaŭ». Komparu la simplecon: 3 silaboj kun 5 literospacoj surpaĝaj kontraŭ 6 silaboj kun 17 literospacoj surpaĝaj. Iu dek-unu-silaba vorto de P-o havas 21 literospacojn sur paĝo kaj la jenan signifon: «Sed, ĉu li, ŝi aŭ ĝi estus iranta tien por fari la saman paroladon denove fojon post fojon ripete por li, ŝi aŭ ĝi?» Tio estas 11 silaboj kun 21 literospacoj kontraŭ 39 kaj 114. Ĉi tio montras ke P-o ŝparos monon en la eldonado kaj tempon en la legado. Ĝia devizo estas: Lernu P-on kaj pensu fulmorapide! Ju pli multe da silaboj vi pensas; des pli malrapide!

P-o havas grandan valoron ĉe la kreado de teknikaj terminoj. Post

mil jaroj la vortaro de E-o aspektos kiel Enciklopedio «Britannica» pro la amaso de novaj fakaj vortradikoj. Vidu la tutkompletan vortaron de la angla - tro da radikoj por ies ajn kapo! En polisintezaj lingvoj oni sentas utilecon kaj neceson formi novan vorton el jam ekzistantaj elementoj (afiksoj kaj/aŭ radikoj). En izolaj, fandaj, kaj aglutinaj lingvoj oni tro ofte sentas utilecon kaj neceson preni novan radikon por nova afero, ĉar interalie ili ne havas amason da tre etaj afiksoj por uzi. En la ĉeroka ekzistas eĉ ĉiutagaj vortoj kiu estas kvazaŭ teknikaj terminoj. Ili tre bone kaj bele funkcias. Ekzemple, 4-silaba ĉeroka vorto por «frato» formiĝas el 7 elementoj ĉiu kun propra signifo. Ĉu vi povas ekpensi vorton en E-o kun 4 silaboj sed 7 afiksoj kaj/aŭ radikoj? La ĉeroka havis multe pli da kontakto kun la angla ol la japana havis, sed la japana havas multege pli da anglalingvaj vortoj ol la ĉeroka; ĉar la japana aglutinas kaj la ĉeroka polisintezas. Do, en P-o, kiel en la ĉeroka, kuracisto, biologo, aŭ eĉ neklerulo ĉe ekvido de nova p-a termino en komputora teknologio havas tuj ian ideon pri la afero. Ĉe informiĝo de la preciza signifo li-ŝi pli facile enkapigas ĝin per alligo ĉe jam establitaj memoroj.

Post la «fina venko» ni ĝistostaj gastamaj verdulaj movadanoj ne plu havos E-on (ĉar ĉiuj parolos ĝin). Ni havos P-on. Se vi troviĝas en amasa e-ista kongreso kaj vi deziras diri sekreton laŭte al amiko; vi rajtas diri ĝin en P-o. Por esti bona lingvisto aŭ bona lingvistikisto vi devas scii almenaŭ unu lingvon el ĉiu de la 4 lingvo-grupoj. P-o estas la plej facile akirebla polisintezita lingvo. Kiam oni flue akiras alian

lingvon oni akiras malsaman spiriton kaj pensmanieron. POLIESPO ESTAS VIA ORA SANCO AKIRI INDIANAN SPIRITON.

La ŝtato rapide penos mortigi min. Mi deziras multege korespondi kun ĉiuj kiuj deziras antaŭ la morto. La ŝtato ŝtelis mian monon kaj tial mi havas neniom. Kun honto kaj pardonpeto, mi do petas vin; bonvolu enmeti internacian respondkuponon kun via letero por ebligi mian respondon. Mi rapide respondos. Mi korespondas en P-o aŭ en E-o. «La Ĉeroka Esperantisto» aperos dufoje en ĉiu monato. Mi sendos ĝin senpage unujaron al ĉiu kiu donacos al mia leĝdefenda fonduso sumon egalan al U.E.A.-kotizokategorio MA(-K) [individua membreco kun jarlibro kaj la revuo «E-o»]. Bonvolu do sendi \$35.00 (usonaj dolaroj) per internacia poŝtmandanto pagebla al Bernice Garrett al la jena adreso: Billy R. Waldon, c/o Max Brande, 425 S New Hampshire #204, LOS ANGELES, CA 90020 U.S.A.

Mi serĉas perantojn - sinproponu. Bernice Garrett kaj Max Brande estas fluaj esperantistoj kaj estroj de mia Defenda Komitato. Ili eksendas la gazeton, ricevas monon, kaj transdonas leterojn al mi. Se vi ne povas donaci tiom, donacu kiom vi povas kaj mi sendos la gazeton laŭ mia povo. Mi ne monavidas. Mi sendus ĝin senpage al ĉiuj se mi povus. La unua numero jam haveblas. Nur ĝin vi ricevos kontraŭ 3 internaciaj respondkuponoj aŭ \$2.00. □

N.I. Sequoyah

*J. P. G. Waldon*

Anglalingva nomo:

Billy R. Waldon

*W. T. Waldon*


## Mesaĝo gravega

de Martin Lavallée

La 24-an de aŭgusto 88 okazos internacia kunveno en kiu la tutfloraj bildkartoj estos elmontritaj. Por fermi solene la Esperantan Jubileon, la Amabla Esperanto-Klubo starigos la ekspozicion dum tri horoj, ekde

la 19-a horo, por la dua fojo. La Esperanta flora bildkartaro estas malkovrita antaŭ la okuloj mirigitaj de l' loka registaro. Bonvolu plimirigi ĝin venante al la municipa halo !

Informo : 649.6409 □



## Message très important

de Martin Lavallée

Le 24 août 1988 aura lieu une rencontre internationale dans laquelle les cartes postales florales seront exposées. Pour fermer solennellement le centenaire de l'espéranto, le Club d'espéranto amablien mettra sur pied pour la deuxième fois, de 19 h à 22 h,

cette exposition, devant les yeux étonnés des autorités locales. Alors veuillez venir les étonner encore plus en allant à la salle municipale !

Renseignements 649.6409 □

## Anonceto

LA LANDA OFICEJO de la Kanada Esperanto-Asocio havas nun novan direktoron : Cyrille Robidoux tiel anstataŭas Sylvain Auclair. Temas pri tute nova esperantisto, preta helpi tuj al la movado, kaj kun granda avantaĝo loĝi apud la oficejo.

Tiel pli klara estos la distingo, en la Landa Oficejo, inter la laboro por E.S.K. kaj la laboro por K.E.A. □

---

## L'espéranto à l'école

---

Une des premières actions entreprises par la Société québécoise d'espéranto a été la rédaction, par M. Pierre Collinge, professeur au département d'études françaises de l'université de Sherbrooke, d'un mémoire sur l'opportunité d'introduire l'enseignement de l'espéranto dans les écoles secondaires et dans les cégeps du Québec, mémoire destiné initialement au gouvernement du Québec.

Puisque plusieurs personnes se demandent ce qu'il est advenu de ce mémoire, et pour le bénéfice des nouveaux membres, voici un peu ce qui s'est passé.

Le mémoire a bel et bien été transmis, il y a déjà quelques années, aux bureaux du premier ministre et du ministre de l'éducation. Plus rien n'empêchait l'enseignement de l'espéranto au niveau secondaire : il fallait seulement qu'un programme d'enseignement soit approuvé par une commission scolaire, qu'il y ait des professeurs compétents et une demande suffisante...

Par la suite, et grâce à une subvention du Fonds éducatif Carson (*Eduka Fondaĵo Carson*), la S.Q.E. a pu imprimer un grand nombre de copies du mémoire ( un peu

modifié ), qui ont alors été envoyées aux commissions scolaires, aux cégeps et à divers intervenants du milieu éducatif québécois. Les avantages de l'apprentissage de l'espéranto sont maintenant connus dans le monde scolaire.

Grâce au travail de deux enseignants sherbrookoïses, Bruno Pelletier et Gérald Côté, un programme d'enseignement a été conçu, puis approuvé par la commission scolaire et le bureau régional du Ministère de l'Éducation. L'espéranto est donc **présentement enseigné**, pour une deuxième année, dans une école secondaire de Sherbrooke, *Le Triolet*. Une vingtaine d'élèves de deuxième cycle ont suivi le cours cette année. Et le cours sera reconduit l'an prochain. Il suffirait donc à des espérantistes, enseignants au secondaire, de présenter un programme semblable, pour ouvrir d'autres classes d'espéranto au Québec.

Rappelons aussi que l'Université de Sherbrooke offre aussi deux cours crédités d'espéranto, donnés par M. Pierre Collinge, cours que tous les étudiants peuvent suivre comme cours à option dans le cadre de leur programme de baccalauréat. □

---

## Quizz sur l'espéranto

---

Mme D'Alessandro el Gela, de Sicile, en Italie, a gagné 69 200 000 livres ( 70 000 \$ ) lors d'un quizz télévisé sur les ondes de la principale chaîne italienne, en répondant à cinq questions sur l'espéranto. Environ 6,5 millions de personnes regardent cette émission. [ Esperanto, mai 1988 ] □



---

## La langue maori

---

Le 1<sup>er</sup> février 1988, une loi a nommé le maori ( langue des autochtones de Nouvelle-Zélande ) langue officielle. Cette loi donne le droit d'utiliser le maori en cour ( mais les juges pourront quand même répondre en anglais, qui restera la seule langue écrite ) et a mis sur pied une commission ( *Te Komihana Mo Te Reo Maori* ) pour concrétiser et appliquer la loi.

En 1840, le gouvernement britannique et les chefs maoris ont

signé le Traité de Waitangi qui garantissait les biens des Maoris, y compris la langue. Par la nouvelle loi, on veut remplir les promesses faites il y a 148 ans.

Certains se plaignent que la reconnaissance du maori n'est que nominale et ne donne aucun nouveau droit aux Maoris, en particulier en ce qui concerne l'éducation. L'enseignement en maori en est encore à ses balbutiements. [ D.E.Rogers, *Monato*, avril 1988 ] □

---

## Une rencontre à Eastman

par Martin Lavallée

---

C'est dans une atmosphère amicale mais cependant incertaine qu'a débuté la rencontre espérantiste québécoise. Elle a lieu dans la petite ville d'Eastman, et c'est très tôt que nos chers hôtes attendaient avec une impatience compréhensible les utopistes pratiques que sont les espérantistes.

Le temps fut superbe. Si vous croyez en un dieu, remerciez-le! C'était même si beau que quelques co-idéalistes ont été, contre les règlements de la municipalité, se baigner dans le lac toutefois bien invitant. C'est sur cette plage que l'enthousiaste et rêveur Martin Lavallée a fait un bel exposé sur les aspects humains du tourisme.

Manuel Campagna fit, le samedi soir dans la cave, une belle lecture de poèmes traduits en espéranto. Normand Fleury a bien évidemment profité de l'occasion pour exposer et vendre de beaux livres d'études, des bouquins, des dictionnaires et des revues espérantistes pour le plus grand plaisir des assoiffés de cultures que sont les espérantistes.

BREF, une belle petite rencontre sans anicroche dans laquelle on s'est raconté quelques plaisanteries, pratiqué au billard bouffé comme des affamés. Ne manquez pas la prochaine ! □

---

### Anonceto

LA LIBROSERVO DE K.E.A. ne funkcios en juilo kaj aŭgusto 1988. Bonvolu ne mendi librojn dum tiu periodo. Dankon. □

---

## Nouveaux documents

---

La Société québécoise d'espéranto est en train de publier quatre documents de deux pages, ayant pour but de montrer aux nouveaux membres de notre association certains aspects du mouvement espérantiste. Ces documents seront publiés, un par numéro, dans ces pages. Le premier commence dans quelques lignes. Les autres ont pour thèmes : quelques revues espérantistes ; l'espéranto et les voyages ; correspondre en espéranto ( et sujets connexes : ondes courtes, collectionneurs et banque d'enregistrements sonores ).

Tous ces documents sont disponibles gratuitement, mais il faut envoyer une enveloppe pré-affranchie. □

---

## Comment apprendre l'espéranto

---

C'est bien beau, l'espéranto, nous direz-vous, mais encore faut-il l'apprendre, cette langue. Est-ce difficile, et comment doit-on s'y prendre ?

### Facile, mais...

L'espéranto est une langue facile. Elle a été conçue comme langue seconde ( même s'il existe des personnes dont c'est la langue maternelle, ou l'une des langues maternelles ) et, pour cette raison, on a voulu faciliter au maximum son apprentissage. Des études sérieuses ont démontré qu'il est de cinq à dix fois plus facile d'apprendre l'espéranto que d'apprendre une autre langue seconde, quelle que soit la langue maternelle de l'étudiant.

Pour un francophone, l'espéranto est encore plus facile. La plupart des racines de l'espéranto proviennent des langues latines, dont le français fait partie, et sont donc directement reconnaissables. Mais cela a un défaut : tous les mots n'ont pas toujours le sens qu'on croit qu'ils ont...

L'espéranto n'en demeure pas moins une langue étrangère. Pour le posséder, il faut non seulement retenir quelques centaines de mots, assimiler plusieurs tournures de phrase dont certaines peuvent sembler étranges à première vue, mais encore faut-il acquérir une sorte de gymnastique intellectuelle : il faut quitter les cadres de la langue française pour penser en espéranto ; il faut apprendre à reconnaître les préfixes, les racines et les suffixes. Il est donc important d'y consacrer régulièrement au moins quelques heures pour le parler.

L'effort en vaut la peine. Non seulement aurez-vous appris une langue vous permettant de faire partie d'une communauté mondiale, mais l'acquisition de l'espéranto aura aussi rendu plus facile l'apprentissage d'autres langues. Ça aussi, des études le prouvent.

### Des cours

Des cours d'espéranto se donnent régulièrement. D'abord, dans les clubs, en particulier à Montréal, où des cours

ont lieu dès que la demande est suffisante.

Des cours ont aussi lieu régulièrement à l'Université de Sherbrooke. Ainsi que dans une école secondaire de cette ville, l'école *Le triplet*

La S.Q.E. peut aussi organiser des stages de fin de semaine là où il n'y a pas encore de club, si la demande semble suffisante. De plus, des séances de cours ont lieu lors des rencontres organisées par la S.Q.E., deux fois par année.

Pour savoir à quel club s'inscrire, comment organiser un stage de fin de semaine ou pour obtenir de l'information sur la prochaine rencontre, adressez-vous à la S.Q.E.

### Des stages

Certains centres offrent des stages intensifs ; c'est l'occasion d'apprendre tout en voyageant. Mentionnons les cours d'été annuels de l'université de San Francisco, ainsi que les centres espérantistes du Château de Grésillon, en France, de la Chaux-de-Fonds, en Suisse, et de Pisanica, en Bulgarie, qui présentent chaque année un programme varié. De par leur clientèle internationale, ces centres rendent nécessaire l'usage continu de l'espéranto : l'immersion n'est-elle pas la meilleure façon d'apprendre une langue ? ( Des formulaires d'adhésion sont disponibles à la S.Q.E. ).

### Des livres

Une autre possibilité s'offre à vous, celle des cours pour autodidactes, à l'aide de manuels — et accessoirement de cassettes, pour la prononciation. Il existe de nombreuses méthodes, dont voici les principales ( les prix sont donnés à titre indicatif ).

— Nouveau cours rationnel et complet d'espéranto, 1981, 177 p. ( 15 \$ ) Il porte très bien son nom et s'inspire d'une approche classique, avec

grammaire, vocabulaire à apprendre et exercices à faire. Une cassette adaptée à la méthode se vend une dizaine de dollars.

— Assimil : l'espéranto sans peine, 1973, 420 p. ( 15 \$ ). Ce livre fait partie d'une importante collection de « Langue » sans peine et est disponible en librairie. Il s'agit d'une méthode quotidienne, sans rien à apprendre par cœur : il suffit de comprendre et de répéter le texte des 98 leçons. Un coffret de quatre cassettes est disponible pour 80 \$.

— On peut aussi trouver en librairie *Je parle espéranto*, de Flash-Marabout.

Tous ces livres et bien d'autres sont disponibles par la poste à la librairie de l'Association canadienne d'espéranto, qui publie également un catalogue gratuit. On peut visiter la librairie en prenant rendez-vous au (514) 495.8442.

Service de librairie espéranto  
6358, rue de Bordeaux  
Montréal H20 2R8.

### Bibliothèques

Y êtes-vous allé récemment ? Les bibliothèques municipales, collégiales et universitaires possèdent souvent des méthodes pour apprendre l'espéranto. Sinon, incitez les responsables à en acquérir. À Montréal, des laboratoires de langues sont à votre disposition gratuitement ( Assimil : l'espéranto sans peine ) dans de nombreuses bibliothèques de quartier.

### Par correspondance

L'Association canadienne d'espéranto offre un cours d'initiation à l'espéranto, gratuit et par correspondance. L'étudiant n'a qu'à payer les frais postaux. Il peut constituer une bonne préparation à un cours plus avancé. Pour recevoir le cours, écrire à la S.Q.E. □

---

# Montreala paĝo

de Patriko Mongeau

## Nova kunveneĵo

Nun okazas du kunvenoj monate. La unua estas iel organizita (estas planitaj programeroj), male la dua estas tute libera (homoj venas por babili). Nuntempe, la kunveneĵo estas ĉe Normando Fleury. Tamen, pro diversaj kialoj, li petas, ke M.E.K. trovu alian kunveneĵon ĝis decembro 1988-a.

Do, ni devas decidi pri nova kunveneĵo. Se iu havas lokon por proponi, ĝi povas esti ĉiam la sama, aŭ oni povas ŝanĝi de monato al monato; por la liberaj kunvenoj, oni povas elekti laŭsezone parkojn kaj restoraciojn, kies etoso tute taŭgus por libera amika interŝanĝo.

Cetere, por informoj pri la klubo, NE TELEFONU al Normando. La sekretario de M.E.K. estas Patriko Mongeau, 270.8856.

## Programo de la venontaj monatoj

Julio: Rapida prezento de la projekto Akvonezio, kaj interŝanĝo de ideoj pri ĝi. (Patriko Mongeau prezentos)

Aŭgusto: Ni havos la viziton de Pol Denis kaj Mireille, el BAR-le-DUC (Francio). Ili proponas al ni prelegon, kantadon aŭ skeĉojn, kiujn ili jam prezentis en sia klubo dum iaj esperanto-aranĝoj.

Septembro: Praktiko de nacilingva interparolo pri Esperanto kun ne-Esperantistoj. Oni ŝajnigos konversaciojn kun diverstipaj homoj, kiuj metas kritikajn demandojn pri Esperanto, al kiuj oni devos respondi. Tio havas la celon plispertiĝi en tiu ofta okazo por Esperantisto, dum kiu maltrafa sinteno malhelpas nian movadon.

---

## Lanĉo

---

Lundon 13-an de junio okazis en la Plant-Gardeno de Montrealo oficiala lanĉo de la du libroj, poemaroj, eldonitaj de ELDONEJO ONDO, de Claude Lebuis: *Scribe haletante* kaj ĝia Esperanta traduko *Skribistino anhelanta*. Pliajn informojn oni povos legi en la venonta RIVEREGO. □

**V**agulbenko de la riverego  
ringa beko de laroj  
mohajro en partigo  
kapoj enŝovitaj en lanugoj  
enpeltigitaj

la malvarmo ŝvelas  
sinkopigas la paŝojn parade  
de l' anseroj piedpremantaj humon

harmonioj kadence spiras  
velo de lundo kun kuŝigita luno  
metalmantelo  
sur rapidaj kaj senriskaj akvoj  
fukosterko tute sola  
naviganta

mi paŝas  
enspiras  
ekzaltiĝas  
de la glutita silento  
de la trairita aŭtuno  
novembra nodo en gorĝo

Helena Blais  
la dudek-sepan de oktobro 1987-a

*traduis Klaŭdo Lebuis*      © Eldonejo Ondo



---

## Ĝenerala kunsido

---

La estraro de E.S.K. alvokas la voĉdonrajtajn membrojn partopreni la jaran statutan ĝeneralan kunsidon de la Societo. Ĝi okazos sabaton, dudek-sepan de aŭgusto mil naŭcent okdek oka, ekde la dek-tria horo, ĉe la sidejo de la Societo: 6358, rue de Bordeaux, en Montrealo.

### Tagordo

#### 0. Malfermo

- elekto de kunvenestro kaj de protokolanto
- akcepto de la tagordo
- akcepto de la protokolo de la lasta ĝenerala kunsido

#### 1. Raportoj de la estraranoj kaj demandoj pri ili

#### 2. Statut-ŝanĝoj


#### 3. Diskuto pri venonta agado

#### 4. Aliaj

#### 5. Fermo

Tiuj membroj, kiuj ne povos ĉeesti la kunsidon, povas sendi al la Societo leteron, legotan dum la ĝenerala kunsido, kun siaj komentoj, demandoj kaj proponoj.

Por la estraro,  
la sekretario-kasisto,



Sylvain Auclair

# La Riverego

Esperanto-Societo Kebekia  
Junio 1988-a. N-ro 11-a.

Ĉi-numere :

La « Ĉeroka Esperantisto » aperas  
Comment apprendre l'espéranto  
Alvoko al la ĝenerala kunsido  
Pri la renkontiĝo en Eastman  
Cours en Baie-Saint-Paul

Société québécoise d'espéranto  
C.P. 126, succ. « Beaubien »  
Montréal H2G 3C8